

Esperanto-vivo en Svislando, 3-a parto
Artikoloj
Claude Gacond, 392-a radioprelego, 1971.04.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum kelkaj semajnoj ni alportos al vi informojn pri la esperanto-vivo en Svislando.

A.- La pasintan semajnon ni raportis pri gazetara informado. Ni diris al vi, ke en niaj artikoloj, anstataŭ paroli pri esperanto mem, ni rakontas, kion oni povas fari pere de esperanto.

Cl.- Inter la gazetoj, kiuj petis artikolojn de ni, troviĝas la revuo *Educateur* [Edukisto], kiun ricevas ĉiuj geinstruistoj en franca Svislando. Por tiu grava pedagogia revuo ni havis la okazon redakti du longajn artikolojn.

A.- La unua menciis, ke por centoj da infanoj en la mondo esperanto estas la gepatra aŭ hejma lingvo. Ni donis statistikojn pri la esperanto-lernado kaj instruado. Kiel kutime ni promesis nian dokumentaron pri esperanto al la informpetantoj.

Cl.- La dua artikolo montris la servojn, kiujn esperanto povus alporti por la instruado de la franca lingvo. Tiu teksto vekis grandan intereson. Hodiaŭ ni tradukas parton el ĝi por doni al vi ideon de artikolo, kiu ne parolas pri esperanto, sed pri ties uzo, kio estas multe pli efika.

A.- Titolo : *Esperanto je la servo de la lerneja lingvo.*

Cl.- Jen ni traduke citas : *La esperanto-instruistoj estas certaj, ke kiam esperanto estos enkondukita en la lernejajn programojn, kaj tiu tago certe alvenos, tiam estos profito inspirogi je esperanto, kies gramatiko estas absolute regula, por instrui nociojn, kiuj sen tio ĉiam restas iomete abstraktaj.*

A.- Ni diros hodiaŭ kelkajn vortojn pri la profito, kiun ni povus trovi, uzante esperanton por la instruado de la franca verba konjugacio.

Cl.- Imagu klason, kie nek la gelernantoj, nek la instruisto scias esperanton. Sen klarigoj ni povas efektiviĝi tiun ĉi eksperimenton :

A.- Sur tabelo, kiun oni metas antaŭ la klaso, oni povas legi :

Cl.- **mi** egalas **je**
ci egalas **tu**
li egalas **il**
ŝi egalas **elle**
oni egalas **on**
ni egalas **nous**
vi egalas **vous**
ili egalas **ils.**

A.- Post tiu tabelo pri la pronomoj en esperanto kaj en la franca oni trovas tabelon pri la verb-finiĝoj : **Infinitivo** egalas **-i**, ktp. Tiel oni trovas **-as, -adis, -is, -os, -us, -u, -ante** kaj **-ita**, kun la responda nomenklature en la franca. La artikolo tiel daŭrigas :

Cl.- La gelernantoj sin demandas, kio estas tio. Sed kiam, sen klarigoj, oni disdonas al ili slipojn, kie ili legos :

A.- **fermi** egalas **fermer**
ŝi fermas egalas **elle ferme**
ni fermos egalas **nous fermerons**
Daŭrigu tradukante en la francan la sekvantajn formojn :
ili fermis
mi fermis

Esperanto-vivo en Svislando, 3-a parto
Artikoloj
Claude Gacond, 392-a radioprelego, 1971.04.14 & 17

**vi fermadis
fermante
ci fermu
oni fermadis
ke ni fermu
fermita**

Cl.- *La gelernantoj tuj komprenos, kion oni deziras de ili. Iliaj okuloj iros de la slipo al la tabelo kaj ili tradukos la donitajn formojn :*

A.- **ils fermeraient
je fermai
vous fermiez
en ferment
ferme
on fermait
que nous fermions
fermé**

Cl.- *En nia klarigo ni ne okupiĝis pri la lerneja nivelo de la gelernantoj. Estas normale, ke se ni troviĝas antaŭ junaj gelernantoj, ni ne proponos nelernitajn nociojn.*

A.- Kaj ni daŭrigas la artikolon donante ekzemplojn pri plej diversaj konjugaciaj kaj gramatikaj ekzercoj, kiujn oni povas fari helpe de esperanto por faciligi la instruadon de la franca lingvo, tio eĉ se la gelernantoj ne scias la lingvon internacian.

Cl.- Per similaj artikoloj ni provis rompi diablan cirkon. Ni rimarkis, ke la gazetoj ĝenerale estas fermitaj al la poresperanta informado, ĉar la esperantistoj ĉiam provas propagandi. Sed tuj kiam ni proponas alispecajn artikolojn, kie esperanto estas prezentata, kiel oni prezentus alian fakon, tiam la gazet-kolumnoj estas tuj je nia dispono.

A.- Ni konvinkiĝis, ke ni devus ĉesi verki ĝeneralajn artikolojn kaj komenci multigi la tekstojn, kiuj donas fakajn informojn. Tiel ni vekus la intereson por esperanto multe pli, ol se ni ripetis aferojn, kiujn ĉiuj kulturitaj homoj jam devus scii.

Cl.- Unu el la taskoj de Kultura Centro Esperantista estas rikolti la gazet-artikolojn, kiuj aperas aŭ kiujn oni povas legi en Svislando. Al tiu rikoltado ne nur kunlaboras esperantistoj, sed ankaŭ simpatiantoj.

A.- Unu tagon de la pasinta somero simpatianto sendis al ni artikolon, kiu aperis en la gravega franca gazeto *Le Monde* [La Mondo]. Tiu artikolo, anstataŭ raporti pri la Universala Kongreso okazinta en Vieno, kiel anoncis ĝian titolon, profitis propagandi pri esperanto.

Cl.- Kaj la sendinto de tiu gazet-eltranĉaĵo prave aldonis :

A.- « *Ĉu vi kredas, ke ni estas stultuloj, por eterne reklarigi al ni, kio estas esperanto, dum ni atendas informojn pri la temo, kion vi faras pere de esperanto ?* »

Cl.- Tiu simpatianto tute pravis. Kiam la esperantistoj komencos informadi pri sia laboro kaj ĉesos provi varbi por la lingvo mem, tiam ili renkontos multe pli da simpatio fare de la vasta publiko. Sed ni devas agnoski, ke se estas facile diri ĝeneralizaĵojn, estas multe malpli facile doni precizajn informojn pri niaj kongresoj, pri niaj libroj, pri niaj sukcesoj aŭ malsukcesoj, ĉar la akurateco kaj fidindeco de la novaĵoj en la esperanta-gazetaro estas kritikendaj.

Esperanto-vivo en Svislando, 3-a parto

Artikoloj

Claude Gacond, 392-a radioprelego, 1971.04.14 & 17

A.- Ni sopiras je la epoko, kiam la organo de la esperantistaj ĵurnalistoj ekludos la atendatan rolon : doni tekstojn fidindajn, kiujn oni povas uzi.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012*